ESPERANTO
MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ
INFORMILO 4
APRILO 2020 Kol. 420/36

xxxx

En la jaro 1885 TGM publikigis sian plej gravan verkon „Fundamentoj de la konkreta logiko: Klasifiko kaj strukturo de scienco“ (Základové konkrétné logiky: Třídění a soustava věd)
En la jaro 1887 TGM veturis en Rusion, kie li renkontiĝis kun L. N. Tolstoj; denove li renkontiĝis kun LNT en la jaroj 1889 kaj en 1910 kiam li rifuzis la doktrinon de LNT pri civila malobeo.



En la jaro 1891 li estis elektita kiel deputito de ĉeĥoj en la parlamenton en Vieno, post la jaro 1903 li propravole demisiis, ĉar li ne konsentis kun la radikala flanko de la partio de ĉeĥaj deputitoj kaj kun interpolitikaj disputoj.
En la jaro 1897 li fariĝis universitata profesoro de la Karolo-Universitato en Prago.
En la jaro 1907 TGM denove fariĝis la deputito en Vieno kaj li laboris tie ĝis la komenco de la unua mondmilito. Tiam li forlasis Aŭstrio-Hungarion. Li estis bone konata ĉeĥa persono, sed li ne havis grandan politikan influon. En Parizo li kun E. Beneš kaj M. R. Štefánik, konstituis Ĉeĥoslovakan nacian konsilion. TGM traktis kun kabinetoj de Anglio, Rusio kaj Usono kaj sukcesis efektivigi la ekeston de la memstara komuna ŝtato de ĉeĥoj kaj slovakoj. La 14-an de oktobro 1918 li fariĝis prezidanto de la provizora ĉeĥoslovaka registaro, post kvar tagoj en la Vaŝingtona deklaracio estis proklamita memstareco de la ĉeĥoslovaka nacio. La 14-an de novembro 1918 TGM fariĝis la unua prezidento de la nova respubliko.
En la jaro 1920, la 27-an de majo, TGM estis denove elektita prezidento laŭ nova ĉeĥoslovaka konstitucio kaj poste ankoraŭ dufoje, en la jaro 1927 kaj 1934. Sed jam la 14-an de decembro

1935 li abdikis. Li mortis la 14-an de septembro 1937 kaj estas entombigita en la tombejo en Lány.

Kompilis L.Srbová

Finkalkulo de AEH de la jaro 2019 + budĝeto por la jaro 2020

	budĝeto 2019	realo 2019	budĝeto 2020
Enspezoj			
dotoj, donacoj	20 000	7 000	10 000
membrokotizoj	22 000	26 890	25 000
seminarioj	0	0	0
ekskursoj	0	0	0
Sume	**42 000**	**33 890**	**35 000**
Elspezoj		**18.150 CZK -**	**nova kopiejo**
materialo	15 000	23 179	10 000
poŝto, telefono, intern.	26 000	21 770	21 000
riparoj, servoj	2 000	496	1 000
gazetoj, libroj	500	0	500
kunvenoj	1 000	0	500
vojaĝelspezoj	1 000	852	1 000
banko	0	20	0
seminarioj	0	0	0
ekskursoj	0	0	0
dotoj, donacoj	500	981	500
Sume	**46 000**	**47 298**	**34 500**
Enspezoj - elspezoj	**-4 000**	**-13 408**	**500**

L. Angelová
prezidantino de AEH

Inĝ. S. Nováková
kontistino de AEH

La 14-a Mediteranea Esperanto-Semajno en "Les Issambres" 29. 2. 2020 - 7. 3. 2020

La lastan superjaran tagon de februaro, la belega hotelo kaj feriejo *Les Issambres* akceptis centon da esperantistoj el diversaj landoj. Pro la korona-viruso *covid-19*, disvastiĝanta fine de decembro en Ĉinio en la urbo *Wuhan* (Vuhano) kelkaj rezignis sian partoprenon. La viruso atingis Eŭropon en februaro kaj rapide disvastiĝis en pluraj landoj kaj tiam furiozis precipe en Italio. Pro ĝi nekutima situacio okazis: ĉe la alveno en la aero ŝvebis nur flugantaj kisoj sen ĉirkaŭbrakoj. Venis esperantistoj el Francio, Belgio, Hispanio, Svedio, Italio, Finnlando kaj Rusio. Kun Katerina Arbekova el la urbo *Novosibirsk*, (kiu gvidis pasintjare la E-kurson) venis grupeto da gejunuloj, kiuj kun granda entuziasmo ĝuis kaj praktikis Esperanton.

La direktoro de la hotelo s-ro Silvain Ceccoto bonvenigis nin sabate antaŭ la vespermanĝo per aperitivo kaj deziris al ni agrablan restadon. La programeroj de la feriejo, kiujn ni povis partopreni, proponis diversajn ludojn, arkopafadon, kvizon, malstreĉan gimnastikon, loterion, minigolfon, diversajn ekskursojn, dancadon kaj aliajn amuzaĵojn.

Ankaŭ nia tutsemajna programo estis riĉa. Okazis kvar diversnivelaj kursoj pri Esperanto. La komencantojn instruis Christine Graissaguel, tiujn, kiuj jam lernis kaj komprenas la lingvon gvidis Elisabeth Ledru (nomita Elinjo).

La lingve pli progresantajn partoprenantojn paroligis Nina Korĵenevskaja kaj por la plej spertaj Mikaelo Bronŝtejn pretigis

varian programon; iom da gramatiko, kvizo, ŝercoj, kantado kun akompano de gitaro. Krome li donis al ni multajn informojn pri sovetia Esperanto-movado kaj pri famkonataj rusaj esperantistoj. Ĉiuj kursoj agrable disvolviĝis kaj la lernantoj estis kontentaj. Dum la paŭzoj Monique Prezioso kaj Simone Marlier pretigis kaj regalis nin per kafo, diversaj infuzaĵoj kaj biskvitoj.

Oni vizitis la urbojn *Fréjus* kaj *Roquebrune-sur-Argens*. Iuj individue veturis al *Saint Tropez*, kiu distancas nur dek kilometrojn de *Les Issambres*. Pro la pluvo kaj la forta vento la vizito al la lagetoj *Villepey* ne povis okazi. Tiam estis proponataj diversaj tabloludoj kun la intenco pliprofundigi la konon de Esperanto. Survoje laŭ la marbordo al la urbeto *Biot*, kie ni vizitis vitrofabrikon, ni admiris belan pejzaĝon. Agrable estis admiri la sunleviĝon ĉe la proksima haveneto de *Les Issambres,* kie la mevoj salutas kaj adiaŭas la spektantojn. Dum la libera posttagmezo ni povis ludi kartojn aŭ promeni en la ĉirkaŭaĵo. Ĉe la marbordo en salono *Batterie* estis interesa ekspozicio pri la aviadilisto, esploristo kaj verkisto *Antoine de Saint-Exupéry*, kiu loĝis en la regiono.



Vespere ni ĝuis gitar-koncerton de Mikaelo Bronŝtejn, Nina Korĵenevskaja montris belajn bildojn de la pentristo Konstantin Vasilyev (1942-1976), kaj kun Nina Cvileneva ŝi prezentis al ni la urbon *Ufa* kaj ties folklorajn ensemblojn. Pri la urbo *Volgograd* prezentis filmon Tatiana Vtorova. Raïta Pyhälä

rakontis pri la artisto Yrjö Saarinen kaj montris liajn pentraĵojn. Gunnar Olsson prezentis al ni bildojn pri sia kolekto de cent tri akordionoj kaj interese parolis pri ili. Ángel Garcia per filmo invitis nin al la ĉi-jara hispana kongreso, kiu okazos en majo en la pitoreska urbeto *Comillas* proksime al *Santander*. Edmond Plutniak parolis pri "Eta Pollando en Norda Francio". Temis pri poloj invititaj enmigri Francion komence de la 20-a jarcento por labori en karbo-minejoj. Ni eksciis pri iliaj malfacilaĵoj, kutimoj, folkloro, kristnaskaj, paskaj kaj geedziĝaj festoj, pri dancoj, sporto, kuirarto. Li entuziasme rakontis pri ĉiuj interesaĵoj. Ĉe la fino gaja muziko dancigis la ĉeestantojn.

En la loka ĵurnalo *Var-Matin* aperis artikolo pri nia aranĝo kun komuna foto.

Dum la adiaŭa vespero ĉiu kursgvidanto pretigis programerojn por distriĝo. Sonis kantoj kaj ni spektis amuzajn teatraĵetojn, skeĉojn, kvizon. Ĉe la fino mi invitis la partoprenantojn al la fervojista kongreso okazonta en Frankfurto ĉe Odro. Poste ni gratulis kaj pridonacis la kursgvidantojn kaj la organizantojn de la evento. Ne mankis kutima loterio kaj dancado kun akompano de akordiona muziko fare de la filinoj Prezioso.

Necesas danki al la organizantoj de la evento, al Christine Grassaguel kaj al la familio Prezioso, kiu ĉiam estas preta helpi. Do, kun pacienco ni atendas novan inviton venontjare al tiu agrabla loko, kie floras mimozoj kaj kie oni bonege manĝas.

Liba Gabalda

Ŝtelisto multon perdis pro la biero

Nekutiman ŝtelon faris 55- jara ĉeĥo en svislanda banko en la urbo Chur. Post ekpafo en la aeron el sia gaspistolo li akiris dek mil frankojn. Pro granda ĝojo kiel li sukcesis, li vizitis proksiman gastejon por trinki bieron.
Pli frue ol li fintrinkis la bieron kaj antaŭ ol la kelnerino alportis la menditan frititan eskalopon, jam kaptis lin policistoj.
La posedantino de la restoracio ekuzis tiun epizodon por reklamo. Sur la pordo ŝi pendigis afiŝon:
„Vi ne bezonas elŝteli bankon por trinki ĉe ni bieron.“

Tradukis anoj de E-klubo Pardubice

Adopto en la bestĝardeno en Prago

La multpersone vizitata ĉiujara E-mentala aranĝo okazis je la 29-a de februaro 2020. Antaŭ la kunveno ni iomete antaŭtimis la veteron, ĉar forte pluvis, sed la vetero ŝatis nin kaj trankviliĝis.

Do ni ĝuis belan tagon. Dum la tagmanĝo tridek partoprenantoj konkuradis pri la plej bongusta kaj la plej bela unubuŝaĵo.

Poste ni iris rigardi, kiel prosperas niaj adoptitaj kaj subtenataj bestetoj. Temas pri la porko Pekari Vagner, takino hinda, lamo Vikuna, Muntzak hinda, guarezo kaj perknoptero. Ĉe ĉiu kaĝo aŭ bestaparta-mento estas tabuleto kun la nomoj de la subtenantoj, do tio estas bela reklamo por Esperanto. Ni vizitis ankaŭ la tute novan pavilonon Rákos kun ekzotikaj birdoj. Ni admiris la grandecon de la plej granda blua papago ARA Hyacinta.



La duan tagon ni jam en pli malgranda nombro promenis tra ravino en kvartalo Modřany, kie estas nove malfermita instrupado.

Prago havas multe da specifaj belaj kaŝanguloj, kiujn ni tre ŝatas ekkonadi. L. Angelová

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová, Lenka Angelová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: aeh@esperanto-aeh.eu interreto: www.esperanto-aeh.eu
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.